

HORIZONTO

*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

10-a Jaro N-ro 59 (5)
Septembro-Oktobro 1985



"LA ESPERO" - JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO - EN GRAZ

JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO EN GRAZ 1887 - 1987

KONSILOJ RENKONTE AL LA JUBILEA JARO

PLIA HISTORIA DOKUMENTO:

PROpono DE ICNEM AL UEA KAJ SAT

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Redakta Komitato: Salvador Gumà, Ivo
Lapenna, Jean Thierry, E. de Zilah.
Adreso de la redakcio kaj administracio:
ELDONEJO PERSPEKTIVO, Nørregårds-
vej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kiu
prizorgas la distribuon de la artikoloj
kaj aliaj tekstoj al la respondecaj mem-
broj de la Redakta Komitato. La redak-
cio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj kofekti la lingvon konforme
al la Fundamento de Esperanto.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la Administracio, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio. Tel.:
01-415615. Pĉk.: Kopenhago 1 19 06 01.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Membreco de ICNEM
(200 dkr.) inkluzivas la abonon. Vidu la
antaŭlastan kovrilpaĝon.

Por recenzo bonvolu scndi 2 ckzemplerojn, por
mencio 1 ckzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ anoncojn.

ENHAVO

11-a IK de N.E.M.: Humaneca Internaciismo - Esperanto kiel Lingva Esprimo de Humaneca Internaciismo (Prof. D-ro Ivo Lapenna)	105
Rezolucioj de la 11-a IK de N.E.M.	108
Decidoj de la Ĉefkunveno de ICNEM (S-ino Marie Thierry)	109
Rezolucio de MFKA (D-ro Eugène de Zilah)..	112
12-a IK de N.E.M. en Ateno	112
Esploro kaj Dokumentado (ED) (Prof. D-ro Ivo Lapenna)	113
Dudek Nacioj en Metz (Jean Thierry)	116
Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz	122
"La Espero" - Jubilea Esperanto-Monumento - en Graz - Inaŭgurota en 1987	123
Plia Historia Dokumentoj:	
Propono de ICNEM al UEA kaj SAT	125
Konsiloj Renkonte al la Jubilea Jaro 1987	127
Libroj Sub La Lupeo (Salvador Gumà)	129
Mallonge	130
Nekrologoj	132

Frontpaĝa bildo: Dum la Inaŭguro de la 11-a
Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-
Movado (ICNEM) en Metz, Francio. De maldekstre:
Prof., S-ino Brigitte Giummelly, prezidantino de la
Kulturdomo kaj protektanto de la Konferenco,
S-ino Madeleine de Zilah (kaŝita), sekretario de
ICNEM, Prof. D-ro Ivo Lapenna, prezidanto de
ICNEM, D-ro Eugène de Zilah, prezidanto de LKK,
kaj la vicurbestrino, S-ino Marie Judlin, protek-
tanta de la Konferenco.

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
Graz. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 228, Capworth Street,
London, E10 7HL. Pĉk. 37.507.9106.
Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Administracio de ICNEM, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre, Kopenhago. Pĉk. Kopen-
hago 1 19 06 01. Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017
Paris. Pĉk. 191707 Z Rennes Jarabono: 100
f.fr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85)
Jarabono: 30 DM

Grekio:

Adda Sakellaroupoulou, Aghias Paraskevis
30, Ateno 816. Jarabono: 100 d.kr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, Banca Mas Sarda:
19000 669/2, Vilafranca del Penedès
(Barcelono), Avenida de Barcelono 35.
Jarabono: 1300 pesetoj.

Israelo:

Faklieru Aviv, IL-58410, Holon, D.Elazar 3,
Tel Aviv. Jarabono: 100 d.kr.

Italio:

Enrico Mingo, Via Simone Martini, 22, Isolato
19, I-80128 Napoli. Jarabono: 17000 liroj.

Japanio:

Joŝiki Tacumi, Nakasu 1-2-24-207, Takara-
zuka-si. Jarabono: 100 d.kr. = 2.329 Yen (JPY).

Jugoslavio:

Prof. D-ro Oton Pancer, Dom Lavoslava
Svarco, Bukovačka cesta 55, Yu-41000
Zagreb. Tekući račun: Zagrebačka banka
30101-620-16-012106. Jarabono: 800 din.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm.
Pĉk. 54175-49. Jarabono: 100 d.kr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70,
I.R. 3015 BC Rotterdam. Pĉk. 333790.
Jarabono: 36 n.gld.

Svedio:

Gösta Persson, Buntmakaregatan 1, S-25248
Helsingborg. Ĝirkonto: 434 1664-3. Jarabono:
100 d.kr.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la
Administracio aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis
peranto en tiu lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn nur
por la tuta kalendara jaro.

11-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

Metz (Francio)

27. julio - 2. aŭgusto 1985



HUMANECA INTERNACIISMO

Tio estis la ĉeftemo de la 11-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Ĝiaj diversaj aspektoj estis prilumitaj en kvin prelegoj kaj diskutoj. Sube aperas tre koncizaj resumoj. Nur la prelego de Ivo Lapenna estas resumita pli amplekse, ĉar ĝi pritraktis la kernan demandon pri la koncepto de humaneca internaciismo kaj de la rilato inter la Internacia Lingvo kaj humaneca internaciismo. Tiusence ĝi servis ankaŭ kiel taŭga fono de la aliaj prelegoj, ĉiuj sur alta universitata nivelo.

La anoncita titolo de la prelego de Walter Zelažny estis "Eblecoj de Humaneca Internaciismo en la Orienteŭropa Esperanto-Movado". Dum la konferenco mem li ŝanĝis la titolon al "Sovetiismo kaj Esperantismo: Teoriaj Problemoj" kaj subtitolo "Provo Analizi, Sintezi kaj Konkludi (Eseo) - Alvoko Helpi al Niaj Aliancanoj!". La resumo de lia tre bone dokumentita kaj valora prelego tamen donas respondon al la demando entenata en la originala titolo.

ICNEM intencas publikigi libroforme la kompletajn tekstojn de ĉiuj prelegoj rilatantaj al monda komunikado (10-a Konferenco, 1984), humaneca internaciismo (11-a Konferenco, 1985) kaj paco-libereco (12-a Konferenco, 1986), se iel eble antaŭ aŭ dum la Jubilea Jaro 1987. Intertempe jen la resumoj.

Prof. D-ro Ivo Lapenna (Britio)

ESPERANTO

KIEL LINGVA ESPRIMO DE HUMANECA INTERNACIISMO

I. Lingvo kaj Socio

Diference de la naturismaj lingvosciencaj skoloj el la romantikisma epoko de antaŭ pli ol unu jarcento - paralelaj al la skoloj de "natura juro" - hodiaŭ ne troviĝas unusola lingvisto, kiu neus la socian karakteron de lingvo. Tiu demando kaj entute la rilato inter lingvo kaj socio estas abunde pritrakitaj ankaŭ en miaj verkoj *Retoriko*, *Esperanto en Perspektivo* kaj en multaj studoj, eseoj kaj polemikaj kritikoj. La konkludo estis kaj restas, ke ĉiu ajn grava socia diferenciĝo kaŭzas lingvan diferenciĝon, kaj ĉiu ajn socia integriĝo estas akompanata de lingva integriĝo. Tra la tuta historio, ekde la homiĝo ĝis la nuntempo, lingvoj formiĝadis, evoluadis kaj malaperadis paralele kun la formiĝado, evoluo kaj malaperado de la sociaj komunaj, al kiuj ili apartenis kaj en kiuj ili servis por pensado kaj komunikado. Siavice, ĉiu ajn lingvo - triba, religia, klasa, kasta, k.a. - efikas kunte, solidarige en rilato al sia respektiva komunaj kaj grave kontribuas al ĝia kohereco. Sed ĉiu lingvo necese ludas ankaŭ fremdigan rolon en rilato al aliaj sociaj komunaj kun propraj lingvaj esprimoj. La neŭtrale-homa Esperanto same tiel efikas solidarige en rilato al sia internacia komunaj, sed pro sia karaktero mem ne povas funkcii fremdige.

2. Formiĝo de Nacioj

Post la malapero de la Okcidenta Romia Imperio kaj longa periodo de mallumo, Eŭropo reaperas kun feŭdisma strukturo, kies esencaj karakterizoj estis: ekonomia memsufiĉo de la feŭda bieno, klasa socio de feŭdaj mastroj kaj servutuloj, ekonomia-politika disrompiteco kaj la mezepoka latina kiel lingva esprimo de la reganta klaso. La iom-post-ioma evoluo de la produktorimedo en la urboj transformis la metian laŭmendan produktadon en manufakturan, poste industrian por la merkato, en kiu mono plenumas decidan taskon. Tiu procezo kondukis al abolo de feŭdismo kaj malapero de ĝia klasa lingvo, al formiĝo de nacioj kaj naciaj ŝtatoj kun vastaj internaj merkatoj sen doganlimoj, naciismoj kaj normaj naciaj lingvoj super la multnombraj regionaj. Ekstrema naciismo ricevis fine la formon de faŝismo, naziismo kaj stalinismo.

3. Internaciismo

La sama ekonomia faktoro, kiu estis esenca por la naskiĝo de la nacio-naciismo-nacia lingvo, estas ankaŭ la ĉefa elemento kaŭzinta la formiĝadon de internaciismo en la senco de egalrajteco de individuoj kaj nacioj, internacia kompreniĝo kaj amikeco de popoloj, integriĝado sur ĉiam pli altaj niveloj, konceptado kaj sentado de la homaro kiel la plej granda socia komunaro, t.e. kiel unueca tuto en diverseco, kondukanta fine al tutmonda integriĝo. Tio estas la kvintesenco de humaneca internaciismo. Je ĝia laŭgrada formiĝado efikis kaj plu preme efikas: la rapida evoluo de teknologio kaj teknikaj rimedoj de komunikado, internacia komerco, modaj merkatoj, daŭre grandiganta interdependeco de la nacioj kaj de tutaj mondopartoj, amasa turismo, ĉiaspecaj aliaj internaciaj kontaktoj inkluzive internaciajn geedziĝojn kaj familiojn, unuflanke; kaj, aliflanke, la reflektiĝoj en la sfero de ideoj, superstrukturaj fenomenoj kun etikaj valoroj, kiaj estas la humanecaj filozofio, artoj, literaturo, internacia juro, pacmovadoj, kortuŝe spektaklaj interhelpoj okaze de naturaj katastrofoj, malsatoj, k.s. En tiu interago de materiaj kondiĉoj kaj ideoj la humaneca internaciismo naskiĝis jam komence de la 17-a jarcento, ekĝermis meze de la 19-a, kaj atingis sian ĝisnunan kulminon en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de 1948. Ĝi markas la komenciĝon de la lasta etapo en la lukto inter la progresanta humaneca internaciismo kaj la ankoraŭ tre fortaj restaĵoj de la ekstrema naciismoj.

4. Esperanto

La nova socia realaĵo speguliĝis sur la lingva kampo en du formoj. Pro la malapero de la latina kaj la vastiĝantaj internaciaj rilatoj sentiĝis kreskanta bezono pri internacia lingva komunikilo. Ekde la "*Ars Combinatoria*" de Leibniz en 1666, de jardeko al jardeko progresie kreskis provoj solvi la demandon. Aliflanke, paralele kun la intensiĝado de internaciaj rilatoj, spontane kreiĝadis ĉiam pli ampleksa internacilingva materialo. Fine de la 19-a jarcento ĝi jam estis tiel abunda kaj la humaneca internaciismo tiel matura, ke Zamenhof povis en 1887 lanĉi sian projekton, kiu baldaŭ transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta internacia komunaro. Tiamaniere la tuthomare vasta humaneca internaciismo ricevis en Esperanto sian lingvan esprimon, kaj kiel tia siavice fortikigas ĝin. Oni ne forgesu, ke la unuaj vortoj eldiritaj de la iniciatinto de la Internacia Lingvo en la Bulonja Kongreso (1905) estis direktitaj al "fratoj kaj fratinoj el la granda tuthoma familio". Ĉiuj agadoj kaj verkoj de Zamenhof, lia tuta vivo estis inspiritaj de humaneca internaciismo, kiun li, science iom neadekvata, nomis "interna ideo", pri kiu ni aŭdos alian prelegon. En ĉiu okazo, esence temas pri la sama afero.

5. "Socialisma Internaciismo"

La humaneca internaciismo en sia koncepta universaleco kovras multnombrajn apartajn internaciismojn kun tuthoma karaktero, ekzemple iujn religiajn,

filozofiajn, sciencajn, profesiajn, ekologiajn, k.s. Eĉ la klasa t.n. "proleta internaciismo", kontraŭstarigita en la *Komunista Manifesto* (1848) al la "liberala-burĝa internaciismo", pro la esperata fina celo - establo de senklasa tuthoma socio - enhavis potencialajn elementojn de humaneca internaciismo. Sed la nuntempa t.n. "socialisma internaciismo", bazita sur la stalinisma koncepto de senrezerva kaj senkondiĉa subigo al USSR kiel "bastiono de socialismo" (1927), kaj pliprecizigita en la doktrino de Breĵnev pri limigita, fakte neekzistanta, suvereneco de la t.n. socialismaj landoj (1968), havas nenion komunan kun la marksisma "proleta internaciismo", nek kun socialismo, nek kun internaciismo, sed estas misuzo de vortoj, por multaj allogaj en iliaj ordinaraĵoj sencoj. La sovetia "socialisma internaciismo" estas unu el la ideologiaj-politikaj instrumentoj de Kremlo, utiligata por obeigi siajn civitanojn, subigi tutajn naciojn kaj vastigi sian potencon. Ne estas surprize, ke eĉ ŝtatoj regataj de siaj respektivaj komunistaj partioj - ekz. Ĉinio, Jugoslavio, Albanio, parte Rumanio - kaj diversaj komunistaj partioj en demokrataj landoj aperte kontraŭas kaj rezistas al la sovetia t.n. "socialisma internaciismo".

6. Konkludo

La sovetiisma ekskluziva ideologio estas la malo de humaneca internaciismo kaj batalas kontraŭ ĝin per la bone konataj rimedoj de sia agitada-propaganda maŝinaro. Tio eksplikas kial la ideologoj de sovetiismo en la Esperanto-Movado organizis la hamburgan puĉon; kial ili daŭrigas la kampanjon kontraŭ la sciencoj nekontesteblian ligitcon inter la Internacia Lingvo kaj humaneca internaciismo; kial ili klopodas senigi nian neŭtrale-homan lingvon de kia ajn idea aspekto. Tamen, ĉar objekte - t.e. tute egale, ĉu oni volas aŭ ne - Esperanto ja estas lingva esprimo de humaneca internaciismo kaj, same objekte, ĝi ja fortikigas ĝin, tiu tuta sovetiisma propagando povis havi nur tute sensignifajn kaj provizorajn sukcesojn. La fakto estas, ke la vastaj tavoloj de la monda esperantlingva komunaro estas kaj ne povas ne esti inspiritaj de humaneca internaciismo. Tial la Esperanto-Movado prezentigas, malgraŭ la internaj malkonsentoj kaj disputoj (eĉ en familioj oni disputas!), kiel avangarda taĉmento de humaneca internaciismo. Ju pli disvastiĝas la Internacia Lingvo kiel instrumento de internacia komunikado, des pli evoluas la humaneca internaciismo; kaj ju pli ĝi evoluas kaj progresas, des pli rapide disvastiĝos Esperanto. Efektive, grandskala plua progreso de humaneca internaciismo ne estas imagebla sen komuna neŭtrale-homa lingvo, ĝia lingva esprimo.

Redakcie

NIA ROLO EN LA JUBILEA JARO

Tio estis la titolo de la inaŭgura parolado de Prof. I. Lapenna al la 11-a Internacia Konferenco de N.E.M. Pro la tro abunda materialo kaj manko de spaco ĝi ne povas aperi en tiu ĉi n-ro. Resumo en formo de artikolo estos publikigita en la sekvanta n-ro de *Horizonto*. Pro la sama kaŭzo ankaŭ aliaj valoraj artikoloj kaj aliaj tekstoj povos esti publikigitaj nur en la sekvanta kaj postaj n-roj de la revuo.

Bedaŭrinde ankaŭ la resumoj de Prof. E. Pauli, Prof. H. Marinov, D-ro E. de Zilah kaj Walter Zelazny povos aperi nur en numero 6.

REZOLUCIOJ

1

La 11-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kunveninte en Metz (Francio) de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1985 kun partoprenantoj el 20 nacioj,

- aŭdinte la raporton de la Prezidanto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) pri la evoluo de la laboroj de la Internacia Kunordiga Komitato por la Jubilea Jaro;
- bedaŭras, ke jam de du jaroj, ĝis nun en tiu Internacia Kunordiga Komitato ne okazis kia ajn pozitiva reago je la insistaj klopodoj fare de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) kaj aliaj sendependaj organizaĵoj por komunaj agadoj surbaze de komuna jubilea laborprogramo;
- esperas, ke almenaŭ la kontrakto-propono prezentita al UEA kaj SAT fare de ICNEM estos akceptita;
- opinias, ke en la nunaj kondiĉoj estas necese manifesti la Centjaran Datrevenon de la "neŭtrale-homa" Internacia Lingvo en demokrata internacijure rekonita neŭtrala lando;
- tial decidas organizi en Graz (Aŭstrio) meze de 1987 JUBILEAN ESPERANTO-KONFERENCON kaj starigi tie la monumenton "La Espero" dediĉitan al Esperanto de la dana skulptisto Jesper Neergaard;
- invitas ĉiujn esperantistojn en la mondo partopreni en tiu JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO.

2

- Analizinte en formo de prelegoj kaj diskutoj plurajn aspektojn de la konferenca ĉeftemo;
- konstatas, ke Esperanto estas lingva esprimo kaj samtempe fortikiganto de "HUMANECA INTERNACIIISMO";
- memorigas, ke la nocio de Neŭtrala Esperanto-Movado respondas al nenio alia ol tiu de "neŭtrale-homa" lingvo de D-ro L.L. Zamenhof mem kaj ekde 1887; ke ĝi longatempe manifestiĝis en Esperanto-organizaĵoj, interalie en Universala Esperanto-Asocio ĝis 1974; ke la Humaneca Internaciismo estas plue gardata de multaj esperantistoj tra la mondo, kaj post 1980 plu subtenata de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado;
- atentigas, ke la Humaneca Internaciismo entenas en si mem la ideon de INTER-POPOLA AMIKARO kaj la principon de PACO EN LIBERECO KAJ LIBERECO EN PACO.

Metz, la 3-an de aŭgusto 1985

Prezidanto
D-ro Eugène de Zilah

Vicprezidantoj
Prof. D-ro Oton Pancer
D-ro Klaus Perko
S-ro Peter Zacho

Sekretarioj-protokolantoj
S-ino Marie Thierry
S-ro Günther Becker

DECIDOJ DE LA ĈEFKUNVENO DE ICNEM

La jara ĉefkunveno de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazis mardon, la 30-an de julio posttagmeze, kaj vendredon, la 2-an de aŭgusto matene kaj posttagmeze. La tagordo, publikigita en *Horizonto* n-ro 3/85, konsistis el 13 punktoj laŭ Art. 6.1.1 de la Statuto. En la diskutoj kaj finaj decidoj la ĉefkunveno konsideris ankaŭ la rekomendojn de la ĝenerala kunveno de la Konferenco, okazinta mardon, la 30-an de julio matene, kaj la proponojn de la Plenumkomitato kaj redakcio/administracio de *Horizonto*, kiuj, kune kun D-ro Eugène de Zilah kaj S-ino Madeleine de Zilah, havis apartajn kunsidojn sabaton, la 27-an de julio posttagmeze kaj plurfoje dum la semajno. Sube aperas la plej gravaj decidoj.

1. Sekretaria Raporto

Ĝi informis pri la laboro de la Plenumkomitato (PK) en 1984/85, precipe pri jenaj agadoj: la daŭrigo de la klopodoj de ICNEM okazigi komunajn agadojn por la Jubilea Jaro, kiuj bedaŭrinde, pro la rifuzo de UEA, fiaskis (v. sube en pkto 3); la bonega akcepto de niaj jubileaj presaĵoj (afiŝoj, poŝtkartoj, glumarkoj); la sukceso de la 10-a Konferenco (v. la raporton en *Horizonto* n-ro 5/84) kaj la helpo donita al la organizantoj de la 11-a en Metz; la klopodoj trovi taŭgan lokon por starigo de la monumento "La Espero" de Jesper Neergaard; la kreskanta influo de *Horizonto*, kiu ankaŭ en 1984 regule aperadis ĉiun duan monaton kaj entute havis 168 paĝojn plus 24 kovrilpaĝojn; la ĵus establitaj rilatoj kun Unio de Internaciaj Asocioj (UIA) en Bruselo; la subvencio de 1000 dkr. al la Akademio de Esperanto; la prelegoj de Prof. I. Lapenna en la filozofia Wittgenstein Simpozio en Kirchberg (Aŭstrio) fine de aŭgusto 1984 kaj la Esperanto-ekspozicio organizita de D-ro Klaus Perko samloke (detaloj en *Horizonto* n-ro 5/84 p. 115); fine, la granda favora eĥo, kiun havis tra la tuta Esperanto-Movado la iniciato de Prof. D-ro Paul Neergaard kaj Prof. Juan Régulo Pérez memorigi per "Deklaro Omaĝe al Prof. D-ro Ivo Lapenna" la 75-jaran datrevenon de lia naskiĝo kaj 55-jaran datrevenon de lia seninterrompa laboro por Esperanto, ĉio kronita per la brila festo en Kopenhago la 15-an de decembro 1984, kiu samtempe estis dediĉita al la 125-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof kaj 30-jara datreveno de la Rezolucio de Unesko favore al Esperanto (v. n-rojn 6/84 kaj 1/85 de *Horizonto*).

2. Financoj

Laŭ la kontoj je la 31-a de decembro 1984, en 1984 *Horizonto* havis deficiton de nur 5.961,67 dkr. ICNEM kovris tiun deficiton per la sumo de 2.891,67 dkr. en 1984, kaj per 3.070 dkr. en 1985. Post la pago de la deficito de *Horizonto* al Eldonejo "Perspektivo", elspezoj por reklamoj kaj presaĵoj kaj subvencio al la Akademio de Esperanto, la neta gajno estis 6.343,07 dkr., tiel ke la kapitaletio je la 31-a de decembro 1984 estis entute 25.190,94 dkr. La gajno de la 10-a Konferenco de N.E.M. estis 8.180 dkr., ricevita la 3-an de januaro 1985 kaj tial eniros la konton por 1985. La kosto de la jubileaj presaĵoj estis 24.934,97 dkr., dum la enspezoj pro vendoj kaj donacoj estis 29.719,37 dkr. El tiu sumo la konto "Jubileaj Presaĵoj" ŝuldas al la ĝenerala konto de ICNEM la sumon de 4.784,40 dkr. Fakte, do, la jubileaj presaĵoj estas jam pagitaj. Restas en la stoko 837 afiŝoj, 4318 poŝtkartoj kaj 1873 glumarkaj folioj. La ĝis nun donacita sumo al la "Fondaĵo Ivo Lapenna" estas 14.305,78 dkr. (v. p. 61 de *Horizonto* n-ro 3/85). Tiu sumo troviĝas en aparta konto en banko kaj donas interezojn.

3. Jubilea Jaro

Konforme al la Rezolucio de la 10-a Konferenco, Prof. Lapenna kaj lia anstataŭanto S-ro Jean Thierry formale restis membroj de IKK kiel reprezentantoj de ICNEM, sed iliaj pluaj klopodoj direktitaj al komunaj agadoj restis seneĥaj. Ĉar la organo de UEA prisilentis ĉiujn niajn tiurilatajn iniciatojn kaj montriĝis, ke eĉ komitatanoj de UEA estas komplete neinformitaj, la Plenumkomitato (PK) de ICNEM sendis la 10-an de julio 1985 al granda parto de komitatanoj de UEA leteron, al kiu estis aldonita la artikolo de Prof. Lapenna "Detruo de Unika Ŝanco", publikigita en n-ro 3/84 de *Horizonto*. Plue, pro la malsukceso de ĉiuj niaj klopodoj organizi komunajn agadojn, la PK de ICNEM proponis al la Estraro de UEA kaj al la Plenumkomitato de SAT almenaŭ mallongan kontrakton pri kunlaboro. La koncerna letero de 02.06.85 kaj la Projekto de Kontrakto aperas en tiu ĉi n-ro de *Horizonto* sur p. 125. Ankaŭ tiu plia historia dokumento estas sendita aparte al komitatanoj de UEA. La ĉefkunveno unuanime aprobis tiun definitive lastan provon de ICNEM atingi almenaŭ kontraktan kunlaboron en la intereso de Esperanto. La respondoj de UEA kaj SAT povos veni nur post la fino de iliaj respektivaj kongresoj. - La prezidanto informis, ke la klopodoj trovi taŭgan urbon (San Marino, La Chaux-de-Fonds, Kopenhago, Graz) por starigi la monumenton "La Espero" de J. Neergaard estas fine kronitaj per sukceso: D-ro Klaus Perko ĵus ricevis leteron de la urbestro de Graz, laŭ kiu la urbestro de tiu urbo estas preta disponigi taŭgan lokon kaj doni subvencion de 50.000 aŭstria ŝilingoj, kondiĉe ke Jubilea Esperanto-Konferenco okazu en Graz en 1987. Pri la monumento v. detalojn en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*.

4. Nova Plenumkomitato (PK)

Post la akcepto de ĉiuj raportoj la Plenumkomitato estis senŝarĝigita kun danko. Pro la deziro de F-ino Marianne Vermaas kaj de S-ino Rie Zacho esti liberigitaj de siaj respektivaj funkcioj, la ĉefkunveno elektis novan PK-on en jena konsisto: prezidanto Prof. D-ro Ivo Lapenna, vicprezidantoj D-ro Klaus Perko kaj S-ro Jean Thierry, sekretario licea profesorino S-ino Madeleine de Zilah, kasisto em. ĉefinstruisto S-ro Peter Zacho. La prezidanto, kiu plian fojon esprimis sian fortan deziron esti liberigita de sia funkcio tuj kiam la cirkonstancoj permesos tion, dankis al S-ino Rie Zacho kaj F-ino M. Vermaas pro ilia sindona laboro. Kompreneble, ambaŭ plu restos aktivaj.

5. Kotizoj kaj Abono

Ili restos la samaj, kiel en 1985 kaj en la antaŭaj jaroj, t.e. 100 dkr. abono al *Horizonto* kaj 50 sv. frankoj aŭ 200 dkr. jare por aktiva membro, 1000 sv. fr. unufoje por ĉiam por apoganto, kaj 2000 sv. fr. unufoje por ĉiam por bonfaranto.

6. Fondaĵo "Ivo Lapenna"

La prezidanto esprimis sian profundan dankon al iniciatintoj kaj kontribuintoj. Li informis, ke ekde 1986 la interezoj de la Fondaĵo estos utiligataj por abonoj al *Horizonto* en nepagipovaj landoj, precipe en Orienta Eŭropo.

7. Horizonto

D-ro Eugène de Zilah estas elektita kiel plia membro de la redakta komitato. Li prizorgos novan rubrikon sub la titolo "Nia Kulturo". La ĝenerala linio de la revuo kaj la proporcio de ĝiaj rubrikoj trovis unuaniman aprobon.

8. Sekvanta Konferenco de N.E.M.

La 12-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazos en Ateno de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1986. S-ino Adda Sakellarpoulou transprenis la taskon formi la lokan organizan komitaton. La ĉeftemo estos la tria punkto de nia mesaĝo okaze de la Jubilea Jaro, nome "Paco kaj Libereco". La ĉeftemo estos pritraktita el filozofia, etika kaj jura vidpunktoj. Estos organizita ankaŭ postkonferenca turisma-kultura semajno.

9. Jubilea Esperanto-Konferenco

La 13-a Internacia Konferenco de N.E.M. ne okazos. Anstataŭe en 1987 okazos Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz (Aŭstrio) de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. La ĉeftemo estos "Cent Jaroj de Esperanto-Kulturo". Dum la Jubilea Esperanto-Konferenco, kiu havos elstaran kulturen programon kaj solenan karakteron, estos ankaŭ inaŭgurita la monumento "La Espero", kiun la skulptisto, Jesper Neergaard, donace dediĉis al Esperanto. D-ro Klaus Perko transprenis la taskon formi taŭgan lokan komitaton. Tiu ĉi decido estu menciita ankaŭ en la Konferenca Rezolucio.

10. Diversaĵoj

Sub tiu ĉi punkto de la tagordo estis pritraktitaj diversaj proponoj kaj mallongaj raportoj. La plej gravaj decidoj estas:

- 1) Doni daŭran subtenon, sen financa respondeco, al Monda Federacio de kulturaj Asocioj (MFKA), kies unuaj sukcesoj jam evidentiĝis;
- 2) Intensigi la informadon pri ICNEM kaj *Horizonto* kun la celo altigi la nombron de membroj kaj abonantoj, interalie per alvoko al ĉiu membro kaj abonanto varbi almenaŭ unu plian;
- 3) Aprobi la decidon de la PK esplori la eblecon aĉeti de "Eldonejo Perspektivo" (Peter Zacho) duonon de la presmaŝino por la tre favora prezo de 30.000 dkr. (brokanta valoro sur la merkato ĉ. 45.000), tiel ke ICNEM kaj "Perspektivo" (P. Zacho) estos kunproprietuloj en egalaj partoj;
- 4) Komisii la PK-on lanĉi kampanjon por financa fortikigo de ICNEM, precipe per kontribuaĵoj al "Fondaĵo Monumento", "Fondaĵo Ivo Lapenna" kaj donacoj por eventuala aĉeto de duono de la presmaŝino;
- 5) Komisii la PK-on publikigi valorajn studojn en serio sub titolo "Jubilea Jaro", en formo de broŝuroj kaj, se eble, libroj. Estas antaŭvidite, ke la unua broŝuro kun la titolo "Defende de Esperanto" (kolekto de eseoj kaj kritikaj studoj verkita de Ivo Lapenna) aperos jam komence de 1986, eble eĉ pli frue.

11. Fermo

En la fermo la prezidanto esprimis dankon al ĉiuj, kiuj per siaj sindona kaj senpaga laboro, financa helpo kaj morala apogo kontribuis al fortigo de ICNEM kaj de ĝia pozitiva rolo en la nuntempa Esperanto-Movado.

Laŭ Protokolo farita de
Marie Thierry



MONDA FEDERACIO de KULTURAJ ASOCIOJ

sub aŭspicio de ICNEM

REZOLUCIO

La 1-a Forumo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj okazinta en Metz (Francio) de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1985 kun partoprenantoj el 20 nacioj,

- konstatas sian unuan sukceson survoje al atingo de siaj celoj kaj la neceson de organo por amaskomunikado;
- aprobas la starigon de Eldona Centro en Metz;
- favoras la projekton de instrua ĵurnalo kun la nomo "La Gazeto";
- kaj dankas la artiston Nonnenmacher, kiu donacis sian laboron por produkti la grafikan projekton.

Metz, la 3-an de aŭgusto 1985

D-ro Eugène de Zilah
Provizora sekretario de MFKA

12-a INTERNACIA KONFERENCŬ DE N.E.M.

KORESPONDA ADRESO: S-ino Adda Sakellaroupoulou, Aghias Paraskevis 30, Ateno 816, Grekio.

DATO KAJ LOKO: De la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1986 en Ateno, Grekio.

PROVIZORA PROGRAMO. - La ĉeftemo estos "Paco kaj Libereco", t.e. la tria parto de la mesaĝo de la neŭtrala Esperanto-Movado al la mondo okaze de la Jubilea Jaro (la du aliaj partoj estis la ĉeftemoj de la 10-a kaj 11-a Konferencoj). La ĉeftemo estos prilumita el filozofia, etika, jura kaj politika vidpunktoj. Estas antaŭviditaj diversaj aliaj kulturaj eventoj, distraj aranĝoj kaj postkonferencaj turismaj programoj.

ALIĜOJ. - Dum la Konferenco de Metz jam aliĝis al Ateno dudeko da personoj. Provizore, t.e. ĝis la formiĝo de la LKK en Ateno kaj fikso de la aliĝkotizoj en drakmoj, oni povas pagi la favoran aliĝkotizon de 200 francaj fr. (ĝis la 1-a de novembro 1985) al la sekretariino de ICNEM, S-ino Madeleine de Zilah, 39, rue Joseph Hénot, F-57070, Metz, pĉk. 262033W Nancy. Alie ĉiujn informojn donas S-ino Adda Sakellaroupoulou je la supra koresponda adreso.

LA EŬROPA PARLAMENTO ĴUS DECIDIS, KE ATENO ESTU DEKLARITA LA "CIVILIZACIA ĈEFURBO DE EŬROPO". ALIĜU BALDAŬ AL LA 12-a INTERNACIA KONFERENCŬ DE N.E.M. KAJ VIZITU AŬ REVIZITU LA LULILON DE LA EŬROPAJ KULTURO KAJ CIVILIZACIO!

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

77 Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF, Middlesex, Britio.

N-ro 49

86. KONFERENCOJ KAJ RAPORTOJ DE CED EN LA ANGLA AŬ CRD KONTRAŬ CED

86.1 CRD Kontraŭ CED

Ĝis nun okazis en New York tri konferencoj de la anglalingva *Center for Research and Documentation on World Language Problems* (CRD), t.e. la nuna laŭnoma posteulo de la iama Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingva Problemo (CED), fondita la 1-an de januaro 1952 kaj funkcianta sub tiu nomo kaj laŭ la originaj celoj ĝis la fino de 1974. Ĝia fundamenta celo estis aperte - do, ne kaŝe aŭ sub falsaj pretekstoj - pledadi por la Internacia Lingvo (Esperanto) laŭ sciencaj metodoj kaj per sciencaj argumentoj bazitaj sur rigore kontrolitaj faktoj. Pri la agadoj kaj atingoj de la tiutempa CED ĉiu interesiĝanto povas koncize informiĝi el la verko *Esperanto en Perspektivo*, eldonita de CED en 1974 (p-oj 669-678), kaj pli detale el la Raportoj de CED en la *Jarlibroj* de UEA 1952-1975.

Tio, kio nun okazas sub la nomo de CED, se entute io okazas, ne nur ne havas kion ajn komunan kun la antaŭhamburga CED, sed rekte kontraŭas al ĝiaj originaj celoj kaj al ĝia tuta senco, kiel plian fojon evidentigas la Raportoj pri la novjorkaj konferencoj.

86.2 Neutiligeblaj Materialoj

La temo de la unua konferenco (decembro, 1982) estis "*World Communications Year 1983: Language and Language Learning*" (Monda Jaro de Komunikado: Lingvo kaj Lingvolernado). La Raporto havas 96 paĝojn. La temo de la dua konferenco (decembro, 1983) estis "*Language Behaviour in International Organizations*" (Lingva Konduto en Internaciaj Organizaĵoj). La Raporto ampleksas 156 paĝojn. Kun la escepto de unusola kontribuaĵo en la franca, ĉio cetera en la du Raportoj estas en la angla. Eĉ ne unu kontribuaĵo en Esperanto, aŭ almenaŭ resumeto en Esperanto de iu el la nacilingvaj kontribuaĵoj. Aldone al inaŭguraj paroladoj en la angla (unu en la franca) dum la lastjaraj kongresoj de UEA, kio estas senprecedenca skandalo, nun, do, ankaŭ la iama CED, nun CRD, angliĝas. La tria konferenco estis okazonta la pasintan decembron (1984), sed ni ne scias, ĉu ĝi fakte okazis. Raporto pri tiu konferenco, se ĝi okazis, ne atingis nin.

En la du Raportoj estas pritraktitaj diversaj temoj, ekz. la lingva edukado en Usono, la nova teknologio de lingvolernado, la organizacia kaj individua dulingvismo en la Sekretariato de UN, la pozicio de la hispana en la Sekretariato de UN, la interŝanĝoj de tradukistoj kaj terminologoj sur la internacia scenejo (en la franca), eĉ la lingvaj problemoj dum la multnaciaj militaj operacioj en Koreio. Kelkaj el la kontribuaĵoj estas neinteresaj, sed pluraj estas vere valoraj. La tutan valoran parton la antaŭhamburga CED sendube estus utiliginta kiel solidan bazon por prilaboro kaj publikigo de dokumentoj - en Esperanto.

kompreneble - bone uzeblaj de la tiamaj preskaŭ cent kunlaborantoj de CED kaj de trideko da tiutempe funkciantaj landaj informaj fakoj de UEA cele al plua kaj plia argumentado favore al la Internacia Lingvo kaj fortikigo de ĝiaj pozicioj. Ĉi tiel praktike estos nenia utilo, ĉar (i) anglalingvaj tekstoj (unu en la franca) ne estas uzeblaj de tiuj, kiuj ne scias la anglan (en unu kazo la francan), kaj eĉ la anglalingvaj organizantoj de tiuj konferencoj devus scii, ke amaso da esperantistoj ne scias la anglan, kaj ke eĉ la sciintoj aktivus por Esperanto kiel lingvo de internacia komunikado, kaj mem uzas ĝin tiucele, ne la anglan aŭ kiun ajn alian nacian lingvon; (ii) internacia reto de CED-kunlaborantoj ne plu ekzistas; (iii) CED-dokumentoj en Esperanto kun nacilingvaj tradukoj ne plu estas eldonataj; (iv) ankaŭ la informa aparato de UEA kun multnombraj landaj informaj fakoj jam delonge komplete kolapsis (laŭ la financa raporto de UEA por 1984 la t.n. "propaganda konto" konsistis el 0 /nulo/ guldenoj). En tiaj kondiĉoj, bedaŭrinde, valoraj informoj pri faktoj, donitaj de kompetentaj personoj, precipe rilate la lingvan situacion en la Sekretariato de UN, restos morta kapitalo el la vidpunkto de la interesoj de Esperanto.

86.3 Esperanto ne Ekzistas

Neniu el la kontribuajoj pritraktas kiun ajn el la multaj aspektoj de la lingva obstaklo al internacia komunikado lige kun la realaj kaj potencialaj solvoj, kiujn prezentas Esperanto. Eĉ ne unu el la Esperanto-parolantoj, kiuj partoprenis la du konferencojn (H. Tonkin, B.A. Sherwood kaj J. Pool), venis al ideo prezenti raporton pri la aktuala uzo de Esperanto kiel instrumento de lingva komunikado en internaciaj rilatoj sur diversaj niveloj, nome ekde simplaj personaj kontaktoj ĝis la utiligo de la lingvo por fakaj kaj sciencaj celoj. Fakte, se oni esceptas la kontribuojn de Bruce Sherwood pri lernado de Esperanto helpe de elektronika korektado de la prononco (pri kies valoro ni ne povas juĝi, ĉar ni ne scias, ĉu la "instruisto" de la maŝino "instruis" al ĝi la ĝustan prononcon), eĉ la nura vorto "Esperanto" apenaŭ troveblas en la du volumoj. En la nuna CRD, kontraŭe al la iama CED, la Internacia Lingvo praktike ne ekzistas. Oni ricevas la impreson, ke oni timas eĉ la vorton "Esperanto".

Laŭ la Jarlibro de UEA, la nuna estraro de CED (angle CRD) konsistas el H. Tonkin (respondeca estrarano), D. Blanke, P. Daŝgupto, B. Golden, U. Lins, J. Pool, B. Sherwood kaj E. Symoens. Ne estas konate, ĉu tiu estraro fakte ion faras, ĉar absolute neniam rezultoj estas videblaj, se oni esceptas la anglalingvajn novjorkajn konferencojn. Tamen estus interese scii, ĉu la tuta estraro decidis havi tiaspecajn konferencojn kaj, se jes, ĉu ĉiuj estraranoj aprobas ilian anglalingvan, Esperanto-kaŝan karakteron.

86.4 Ne nur Intelektala Stagno, sed Intelektala Malhonesteco

Kiel *Horizonto* informis en n-ro 4/85 sur p. 86, UEA publikigis bruŝuron pri la rilatoj inter UEA kaj Unesko, en kiu ne troviĝas unusola linio pri mi, eĉ por ne paroli pri miaj iniciatoj kaj atingoj sur tiu kampo: konsultaj rilatoj, Rezolucio de 1954 favore al Esperanto, Serio Oriento-Okcidento, diversaj eldonaĵoj en Esperanto (ne en la angla!) je la kostoj de Unesko, ktp. dum mia fakta gvidado de la eksteraj rilatoj de UEA dum pli ol kvaronjarcento. En la Esperanto-elsendo de la Svisa Radio de 03.11.84 C. Gacond nomis tian prisilentadon "intelektala stagno".

En la fino de ambaŭ pritraktataj Raportoj troviĝas informoj pri tiu CRD, laŭnome - estu ripetita - daŭrigo de la iama CED. Plian fojon mia nomo eĉ ne estas menciita. Absolute nenio estas dirita pri la fondo de CED, pri la libroj kaj centoj da dokumentoj, kiujn ĝi publikigis, pri la fondo kaj regula aperado de la prestiĝa revuo *La Monda Lingvoproblemo* sub aŭspicioj de CED, nek pri kiu ajn alia agado de CED dum ĝia 23-jara funkciado sub mia honorofica direktoreco. Plue, ne estas menciita la fakto, ke CRD (CED) estas institucio de UEA.

Tia prisilento - fakte nur parteto de la ĝenerala multjara prisilentado kaj misprezentado de kio ajn ligita al mia nomo - estas neimagebla en kiu ajn kultura organizaĵo, des malpli en institucio pretendanta sciencecon. Tio ne estas sole "intelekta stagno". Ĝia vera, neeŭfemisma nomo estas intelekta malhonesteco. Tion mi diras sen ereto da persona amaro - nenio en la nuna UEA povas en kiu ajn senco amarigi min persone -, sed ja kun sento de profunda bedaŭro pro la terure falinta intelekta kaj etika niveloj de la gvidaj instancoj de UEA, kio en la nunaj kondiĉoj necese stampas la Asocion kaj, eĉ pli bedaŭrinde, kompromitas la Esperanto-Movadon kaj la lingvon mem.

Ĉu fakte ĉiuj membroj de la estraro de CED (CRD) - ekzemple Daŝgupto, Golden, Lins, Symoens por menciigi kelkajn nomojn eksplicite - aprobas tiajn falsaĵojn? Ĉu inter la komitatanoj de UEA ne troviĝas almenaŭ kelkaj, kiuj kondamnas ilin? Se jes, kiel mi supozas, kial ili ne aŭdigas publike siajn voĉojn? Kaj, fine, ĉu la Membroj de la Patrona Komitato de UEA kaj almenaŭ parto de la Honoraj Membroj de la Asocio ne devus rekonsideri sian Patronecon resp. Honoran Membrecon por ne kompromiti siajn honorindajn nomojn per patronado resp. honorigado de organizaĵo regata laŭ metodoj aplikataj nur en totalismaj ŝtatoj? Nun mi plian fojon konstatas kiel prave mi agis, kiam jam en 1974 mi ekŝiĝis el Honora Membreco kaj rifuzis akcepti la proponitan Honoran Prezidentecon de UEA.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 2o.2 de Esperanto en Perspektivo kaj la tutan verkon Hamburgo en Retrospektivo.

Donacoj al la Jubilea Esperanto-Monumento

La unuaj ricevitaĵoj kaj promesitaĵoj donacoj:

D-ro André Albault, Francio	1.000,00 dkr.
S-ro Günther Becker, Germanio	1.000,00 "
S-ino Maria Becker Meisberger, Germanio	1.000,00 "
S-ro Henri Dabiez, Francio	1.000,00 "
D-rino Käthe Rukavina Danon, Germanio	3.000,00 "
S-ro Rafaelo Devis/Fervojista Grupo de Barcelono, Hispanio	1.000,00 "
S-ino Els Kervers van Tholen, Nederlando	1.000,00 "
Prof. D-ro Ivo Lapenna, Britio	2.000,00 "
S-ro Jens Stengaard Larsen, Danio	500,00 "
Anonima, Nederlando	500,00 "
MFKA, Ateno, Grekio	500,00 "
MFKA, Metz, Francio	1.000,00 "
S-ino Irmgard Müller, Germanio	1.000,00 "
D-ro Klaus Perko, Aŭstrio	1.000,00 "
S-ro Gösta Persson, Svedio	1.000,00 "
D-rino Adda Sakellarpoulou, Grekio	1.000,00 "
S-ro Hans Schütt, Germanio	1.000,00 "
S-ro Petrus H. van Terwisga, Nederlando	1.000,00 "
S-ro Jean Thierry, Francio	1.000,00 "
F-ino Marianne Vermaas, Nederlando	1.000,00 "
S-ro Gaston Veron, Francio	500,00 "
S-ino Madeleine de Zilah, Francio	1.000,00 "
D-ro Eugène de Zilah, Francio	1.000,00 "
24.000,00 dkr.	

JUBILEA ESPERANTO-KONFERENCO EN GRAZ

DUDEK NACIOJ EN METZ

TAGLIBRAJ NOTOJ

JEAN THIERRY

SABATON posttagmeze. - Metz, la dumiljara urbo, simbolo de jarcentaj konfliktoj inter la pranepoj de Karolo la Granda, tre zorge atendis la partoprenantojn en la 11-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Jam radiointervjuo kun Prof. D-ro Ivo Lapenna estis disaŭdigita tra la regiono; kaj tra la stratoj de la mezepoka centro multaj afiŝoj kaj lumaj paneloj indikis la direkton al "ESPERANTO CONGRES". Ekde la 15-a en "Les Récollets", tiu iama monaĥejo sur promontoro rigardanta al la du riveroj Sejlo kaj Mozelo, kies kunfluejo naskis la urban neston, estis akcepto de ĉiuj konferencanoj fare de la loka grupo kun disdono de informoj, dosieroj, kaj prezento de konstanta filmo kun mirinde brilaj bildoj pri la urbo.

Ekde la 20-a ĉiuj kunvenis tie por interkona vespermanĝo, dum kiu ĉirkaŭ tabloj de ses ĝis ok personoj ĉiu povis kunpreni specialajn manĝaĵojn de la regiono kaj ilin gustumi, babilante kun geamikoj kaj novaj gekonatoj. Bonega iniciato, tuj kreanta varman etoson, dum okazis krome loterio de plej diversaj donacetoj fare de la Metz-aj gekomercistoj.

DIMANĈON - En la sama loko ekde la 9-a matene estis la Inaŭgura Kunsido kun salutvortoj de la prezidanto de LOK, D-ro de Zilah, bonvenaj vortoj de S-ino Marie Judlin, vicurbestrino de Metz kaj S-ino Brigitte Giummelly, prezidantino de la Kultur-Domo. Sekvis elekto de la Konferenca Prezidantaro, prezidanto: D-ro Eugène de Zilah, vicprezidantoj: Prof. Oton Pancer, D-ro Klaus Perko kaj S-ro Peter Zacho, sekretarioj-protokolantoj: S-ro Günther Becker kaj S-ino Marie Thierry. Sekvis parolantoj el dek sep reprezentitaj nacioj (dum la semajno estos el dudek nacioj). La kunsidon finis Inaŭgura Parolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu disvolvis riĉajn komentojn pri la ĉefaj frapfrazoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado, nome: MONDA KOMUNIKADO, INTERPOPOLA AMIKECO, HUMANECA INTERNACIIISMO, kaj POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO.

Dum la posttagmezo pluraj grupoj estis gvidataj de Metz-anoj tra la urbo plena je interesindaĵoj foje datigantaj jam de dek aŭ dek kvin jarcentoj, interalie la XIII-jarcenta Katedralo, kiu posedas la plej vastan vitralan surfacon tra la mondo, la Arkeologia Muzeo, kiu enhavas rimarkindajn pratempajn tombojn, kaj diversaj monaĥejoj kaj remparoj, kaj malnovaj pontoj kaj domoj (inter ili XIV-jarcenta Turo, XVIII-jarcentaj Urbdomo kaj Parlamentejo).

En la Kultur-Domo dum la vespero la teatra grupo "La Krizalido" prezentis teatraĵon de Francois Boyer laŭ traduko de Georges Lagrange: "Aminda Kretenino", pensigan provon gustumigi la modernan teatron tiel ofte neatenditan: la ludo estis atentoveka kaj ricevis viglan aplaŭdodon.

LONDON - Matene en la Kultur-Domo la Konferencon salutis D-ro A. Albault, prezidanto de la Akademio; kaj sekvis prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna pri "Esperanto kiel Lingva Esprimilo de Humaneca Internaciismo". Ampleksa resumo de tiu baza prelego aperas sur la unua paĝo de tiu ĉi n-ro.

Je la 11-a Prof. D-ro Ĥristo Marinov prelegis pri "Ekologio kaj Humanismo", memorigante al ĉiuj la avertajn antaŭzorgojn de la ekologioj tra la mondo. Ankaŭ tiu prelego estas resumita en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*.

Ĉirkaŭ la 15-a malfermiĝis la Unua Internacia Forumo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj. Pri spertoj interalie intervenis Prof. Evaldo Paŭli por la Filozofia Asocio, kies sidejo estas en Metz, kaj kies revuo *Simpozio* estis lanĉita en Budapeŝto (1983). Li memorigis tute prave, ke oni studas ion, ne ĉar ĝi



En multaj lokoj la urbo Metz metis montrilojn
"CONGRES ESPERANTO"

Nia afiŝo troviĝis en multaj
montrofenestroj de butikoj kaj
restoracioj. Jen ekzemplo






Vicprez. de ICNEM, S-ro Jean Thierry,
kaj vicprez. de ICNEM kaj de la Konferenco,
D-ro Klaus Perko, kiu organizas
la Jubilean Konferencon 1987 en Graz



La pola violonisto,
Bogumil Wlodarski



Vicprezidanto
de la Konferenco
kaj kasisto de ICNEM,
S-ro Peter Zacho




1. La nova sekretario de ICNEM, S-ino Madeleine de Zilah, en la akceptejo kun junaj deĵorantoj
2. Prez. de la Konferenco, D-ro Eugène de Zilah, vicprez. de la Konferenco, Prof. D-ro O. Pancer, kaj la preleginto, Prof. D-ro E. Pauli
3. Prez. de Akademio de Esperanto, D-ro André Albault, kaj S-ino Berthe Albault
4. Ges-roj Maria kaj Günther Becker en agrabla societo



1


La 11-a IK de N.E.M.



60



2



3



4



estas facila, sed ĉar ĝi estas utila... S-ino Adda Sakellaroupoulou parolis pri sia grupo en Ateno; S-ro Hernandez Yzal alvokis helpojn por sendado de duoblaĵoj al la muzeo nun donacita al la Kataluna Asocio; Prof. D-ro Ĥristo Marinov, elvokante la staton de ekologio en Bulgario proponis, ke oni internaciigu per materialo la muzeojn. Ĉirkaŭ la 17-a okazis la Ĉefkunveno de la Internacia Asocio de Juristoj (IEAJ). La revuo de ĉi tiu asocio estas modelo de faka profesia periodaĵo en Esperanto. Raporto aperos en *Internacia Jura Revuo*.

MARDON - La salono estas plena por la Ĝenerala Kunveno de la Konferenco. Sinsekve estas pritraktitaj la preparlaboroj por la Jubilea Jaro, la formiĝo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj (MFKA), la kontrakto-projekto pri kunlaboro inter ICNEM, SAT kaj UEA por la Jubilea Jaro, la plifortikigo de ICNEM kaj *Horizonto*; fine por la projekto de Konferenca Rezolucio estas nomita komisiono de tri membroj (Günther Becker, Klaus Perko kaj Jean Thierry). Pri MFKA raportis D-ro E. de Zilah, kiu redeklaris la celon de la Federacio: ĝi estas organiza provo de rekta demokratio inter lokaj grupoj kaj fakaj asocioj sen "piramideskaj stultuloj" kaj surbaze de forumo sub aŭspicio de ICNEM; la bona funkciado de la Federacio nepre kondukos al estonteca fondo de eldon-centro kun libroservo kaj eldono de bulteno kun la nomo *LA GAZETO*. Necesas enkapigi la ideon, ke Esperanto ne estas "hobio", sed ja riĉiĝo de la kulturo.

Ankaŭ en la posttagmezo por la Ĉefkunveno de ICNEM pleniĝas la salono. Aŭdiĝas raportoj de la sekretario pri la agado de ICNEM en 1984-85, de la kasisto pri la financa stato, kaj de la prezidanto pri la preparlaboroj por la Jubilea Jaro. La decidoj estas resumitaj aliloke en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*.

Je la 21-a en la preĝejo St-Martin kungrupiĝis konferencanoj kaj loĝantoj de Metz. Estis inspira koncerto de la mondfama Metz-a Ĉanĥoro, kies prezidanto D-ro Marc-Mathieu Münch, profesoro pri literaturo en la Universitato de Metz, estas protektanto de la Konferenco. Tro malofta okazo ĝui la mezepokan voĉarton, kun temo kaj tekstoj speciale elektitaj en rilato kun la ĉeftemo de la Konferenco, *La Komuna Dio*, en du partoj: *La unua alianco* el la Malnova Testamento: (1) La Elektita Popolo, (2) La Sankta Civito, (3) La Atendo; - *La nova alianco* el la Nova Testamento: (1) Dio Revelaciita al Nacioj, (2) Disetendiĝo de la Spirito, (3) La Universala Frateco; kaj ĉe la fino triumfa TE DEUM.

MERKREDON - Jam ekde la 8-a matene komforta aŭtobuso atendas la ekskursantojn al la batalkampoj de Verdun kaj al la malkovro de la hejmdekoracia *Ecole de Nancy*. Verduno estas nomo jam tre konata kaj de la francoj kaj de la germanoj, ĉar por ili simbola pro la traktaĵo de 843 subskribita de la tri nepoj de Karolo la Granda; sed ĝi fariĝis mondfama pro la plej granda batalo de la Unua Mondmilito en 1916, batalo kies Memormonumento inaŭgurita en 1967 celas nun simboli la definitivan reamikiĝon de la pranepoj de Karolo. Tre afable nin akceptis la Direktoro mem de la Memormonumento: li rememorigis la celon de la organizaĵo kontraŭ la abomenaĵoj de milito, dum kies Verduna periodo sesdek milionoj da obusoj trapugnis ducent dek mil hektarojn de la batalkampoj, detruante naŭ vilaĝojn. Estis subskriboj sur la Or-libro kaj peto de la Direktoro por esperantigo de diversaj dokumentoj. Tre emociaj estis la vizitoj al la Ostejo de Douaumont kaj al la Tranĉeo de l' Bajonetoj, kie soldatoj estis enterigitaj de obuseksplodo kaj restis tie starantaj en la tero, el kies supraĵo nun elstaras nur la bajonetoj!....

Post komuna manĝo en vilaĝa restoracio la aŭtobuso traveturis la urbon Nancy kaj aparte la placon STANISLAS. La ekskurso finiĝis per la muzeo de la *Skolo de Nancy*. La fondinto Emile Gallé (1864-1904) finfaris sciencajn studojn, eklaboris en patra fabriko kiel majstro-vitristo, kaj inspiriĝis el internaj vegetalaj strukturoj por sia metia arto. Kun la vitroartisto Daum, la meblisto Majorelle, la artlignaĵisto Vallin, kaj la pentristo skulptisto kaj juvelisto Prouvé, li fondis ekde 1901 societon, kiu influis la arĥitekturon, fasadaĵajn elementojn, framojn de pordoj kaj fenestroj, balkonojn kaj kamenojn; transformante ilin en ornamaĵojn, kiuj "elvokas vegetalaĵojn" (M. de Zilah).

VENDREDON - Matene en la Kultur-Domo D-ro Eugène de Zilah eldiris la lastan el la prelegoj: "Interna Ideo de Esperanto kaj Humaneca Internaciismo". Kvankam ankaŭ la resumo de lia prelego aperas en tiu ĉi n-ro de *Horizonto*, tamen jen komenteto. Post diferencigo inter opiniado bazita sur kredo, deziro, sperto, senso aŭ timo, kaj pensado konstruita sur senkontraŭdira rezonado, li montris, ke per sia formulo "Interna Ideo" D-ro L.L. Zamenhof estis pli sentema ol konscia pri la konceptoj rilataj al la lingvo kiel instrumento de Esperantismo. Sur dialektika nivelo, kontraŭstare al la mistika, la lingvo mem per elekto de sia strukturo, vortaro kaj verkaro evidentigas iun humanismon, kiun karakterizas la ekzisto de transcenda subjekteco tuthoma kaj de neŭtrale-homa lingvo kontraŭ "muroj de miljaroj". Esperanto prezentigas kiel la plej civilizita lingvo en defendo de la "justulo" aŭ individuo kontraŭ ĉia premo de iu ajn kolektivo. Altnivela meditinda prelego!

Sekvis daŭrigo kaj fino de la ĉefkunveno de ICNEM.

En la posttagmezo ĉiu povis aŭskulti novan recitalon de S-ro Bogumil Włodarski, kiu violone ludis pecojn de J.S. Bach, Corelli, Händel, kaj polan kanzonon de Wieniawski. Ĉiu povis ankaŭ vidi aŭ revidi lumbildojn pri la urbo Metz kaj video-kasetojn pri la Konferenco, aĉeti son-kasetojn kun la prelegoj kaj la muzikaj programoj interalie kun "La Espero" ĥore kantata laŭ originala muzika manuskripto, kun pecoj de la Ĉant-ĥoro en St-Martin, kaj de komponaĵoj luditaj de la violonisto S-ro Włodarski dum la Konferenco. Originala, tre bonvena iniciato de la Esperanto-Klubo en Metz.

SABATON - Matene en la Kultur-Domo okazis la ferma kunsido: post resumo de la decidoj kaj rekomendoj faritaj dum la semajno ekestis vigla debato pri la tri rezolucioj preparitaj de la komisiono: unu pri la Jubilea Jaro, alia pri la "Humaneca Internaciismo", kaj tria pri la Unua Forumo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj; ĉiuj en definitiva teksto estis akceptitaj unuanime (Vidu la tekstojn mem sur paĝoj 108 kaj 112).

Jen jam venis la fino, la momento de dankesprimoj tre varmaj al D-ro Eugène de Zilah, al S-ino Madeleine de Zilah, kaj al la tuta grupo de Metz, kiu tiel bone helpadis en la organizado: ĉi tiu 11-a Konferenco estis sendube unu el la plej bone organizitaj kaj la plej sukcesa el ĉiuj ĝisnunaj ankaŭ el vidpunkto de informado: du radio-elsendoj, pluraj artikoloj en la gazetaro, niaj jubileaj afiŝoj en elmontrofenestroj de butikoj kaj magazenoj, aliaj afiŝoj pri la koncerto honore al la Konferenco. Vere, multon oni povis aŭdi kaj legi pri Esperanto dum nia 11-a Konferenco.

Ĝis revido en Ateno en 1986 kaj amase en la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz en 1987.

J. T.

AFIŜOJ - POŝTKARTOJ - GLUMARKOJ

La belegaj jubileaj afiŝoj devus jam nun troviĝi en ĉiu lernejo, en ĉiu oficejo, en ĉiu alia taŭga loko alirebla al la publiko.

La luksaj jubileaj glumarkoj elvokis ĉie nur laŭdojn. Uzu ilin sur ĉiuj korespondaĵoj, ankaŭ al neesperantistoj, el kiuj la grandega plimulto komprenos ankaŭ la tekston.

La jubileaj poŝtkartoj kun la jam vaste konata simbolo disvendiĝas tre bone. En 1984 aperis dua eldono. Uzu ilin kiel eble plej multe por gratuloj, bondeziroj, mallongaj komunikoj.

La jubileaj eldonaĵoj de ICNEM per siaj simbolo kaj teksto donas la ĝustan mesaĝon pri la Internacia Lingvo (Esperanto). Utiligu ilin vaste por kontribui al la Jubilea Jaro per ĝusta informo kaj por helpi al plua disvastigo de Esperanto en la ĝustaj medioj. Prezo: 4 afiŝoj 60,- dkr., 10 poŝtkartoj 25,- dkr., folio de 8 luksaj glumarkoj 6,- dkr. Mendu la necesajn kvantojn ĉe: Administracio de ICNEM, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, poŝta ĉekkonto: Kopenhago 1 19 06 01.

Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz

1887 - 1987

UNUAJ INFORMOJ

LOKO KAJ DATO. - La Konferenco okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 en Graz (Aŭstrio), do en lando, kies neŭtraleco estas internacijure rekonita. Ĉar la Jubilea Kongreso de UEA okazos en Varsovio, tiu de SAT en Krakovo (Pollando), planita festivalo en Zagreb (Jugoslavio), do ĉiuj en unupartiaj ŝtatoj, verŝajne tre multaj ŝatos partopreni Jubilean Konferencon, dediĉitan al centjara datreveno de la neŭtrale-homa lingvo, en demokrata, neŭtrala lando.

ĈEFTEMO. - La ĉeftemo estos "Cent Jaroj de Esperanto-Kulturo". Estas antaŭviditaj prelegoj, publikaj debatoj, impona Esperanto-ekspozicio, teatraĵoj, kanthoroj kaj aliaj kulturaj eventoj, ĉio sur la plej alta kultura nivelo. Aldone, diversaj akceptoj kaj distraĵoj aranĝoj. Dum la Konferenco estos ankaŭ inaŭgurita la Jubilea Esperanto-Monumento ("La Espero" de J. Neergaard).

ALIĜOJ. - En Metz, post la anonco de la jubilea konferenca urbo tuj aliĝis 24 personoj. La baza aliĝkotizo estas 600 aŭstriaĵ ŝilingoj ĝis la 1-a de septembro 1986, kaj 700 aŭstriaĵ ŝilingoj post tiu dato ĝis la 31-a de decembro 1986. Ekde la 1-a de januaro 1987 la kotizoj estos pli altaj. Jam antaŭ la definitiva formiĝo de la Loka Konferenca Komitato aliĝojn kaj aliĝkotizojn akceptas D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, pĉk. 1257.845.

TRE BALDAŬA ALIĜO MULTE HELPOS AL LA ORGANIZANTOJ!

DUDEK NACIOJ EN METZ (Daŭrigo)

ĴAŬDON - En la matena programo enestis du pliaj pensigaj prelegoj. La unua de Prof. Evaldo Paŭli temis pri "Internacia humanismo kaj edukado", dum tiu de S-ro Walter Zelazny rilatis al "Sovetiismo kaj Esperantismo". Resumojn v. aliloke en tiu ĉi n-ro.

Inter la du prelegoj S-ro Bogumil Wlodarski prezentis violonan recitalon.

En la posttagmezo okazis Simpozio de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT), kiu prezentis kaj sian revuon *Simpozio* kaj sian celon pligrandigi la filozofian literaturon en Esperanto. Samtempe montriĝis perletere stranga sinteno de instruistino pri filozofio, S-ino Claude Nourmont-Moon, kiu loĝas en la proksimeco kaj ne hezitis skribi al la prezidanto "filozofiecan" leteron, "ordonante" al li: "Vi ne rajtas" ĉeesti la Konferencon en Metz! Senkomente pri ŝia "filozofieca" plumo! Ĉu mirinde, se post tio ne multaj el Nancy venis al la Konferenco?!

Vespere en la hotelo Frantel ĉiuj retroviĝis ĉirkaŭ la 19-a por partopreni en bankedo kaj balo kun la orkestro "Les Ouragans" (La Uraganoj), kies dirigento kantis plurajn kanzonojn en Esperanto. Bela vespero tre agrabla por ĉiuj!

"LA ESPERO" -

JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO - EN GRAZ

Inaŭgurota en Julio 1987

La belega skulptaĵo "La Espero" de la dana reno-
ma skulptisto Jesper Neergaard, filo de Prof.
D-ro Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio
de Esperanto, estos starigita en Graz (Aŭstrio)
kaj inaŭgurita dum la Jubilea Esperanto-Konfe-
renco, plej verŝajne la 25-an de julio aŭ la 1-an
de aŭgusto 1987. La marmora modelo de la
skulptaĵo, ekspoziciita kune kun aliaj verkoj de
J. Neergaard en Kopenhago fine de 1984, ricevis
tre favorajn kritikojn en la danaj fakaj revuoj
kaj gazetaro. Ĝia fotoreproduktaĵo sur la jubileaj
afiŝoj, poŝtkartoj kaj glumarkoj elvokis estetikajn
admiron de ĉiuj: esperantistoj kaj neesperantistoj.



Dediĉita al Esperanto

Laŭ la sugesto de la subskribinto, al kiu J. Neergaard donacis la marmoran
modelon okaze de la diversaj datrevenoj en decembro 1984, la skulptisto dediĉis
sian verkon al la Internacia Lingvo (Esperanto) por la Jubilea Jaro 1987.

La monumento estos skulptita el mondfama blanka marmoro de Carrara (Italio),
kaj la dimensioj estos minimume 175x150x70 centrimetroj. La soklo de la
monumento estos el malhele-verda norvega granito kaj havos la dimensiojn de
minimume 45x150x80 centrimetroj. Do, la monumento estos alta minimume 225
centrimetrojn. La definitiva grandeco de la monumento dependas de pluraj
faktoroj, interalie de la preciza loko, sur kiu ĝi estos starigita, kaj de la
 disponeblaj financaj rimedoj. Pri la loko decidis la Oficejo pri Planado, Kulturo
kaj Ĝardenoj de la urbo Graz interkonsente kun la skulptisto. La plej taŭga loko
estus la "Placo de Homaj Rajtoj", aŭ la belega urba parko. "Placo Esperanto",
kiu jam ekzistas en Graz, ne estus tre konvena, ĉar tro trafika por tia sublima
kaj pensiga skulptaĵo.

Efektivaj Kosto

Siajn krea artan inspiron kaj laboron je la skulptado de la monumento J. Neergaard decidis donaci al Esperanto pere de la subskribinto. Restas, tamen, la efektivaj kosto por aĉeto de la marmora kaj granita blokoj, transportaj kosto el Italio kaj Norvegio en Graz, salajroj de laboristoj, k.s. Laŭ la nunaj prezoj ili estos minimume 100.000 danaj kronoj. La urbestro de Graz decidis doni subvencio de 50.000 aŭstria ŝilingoj, t.e. proksimume 23.000 dkr. Dum la Internacia Konferenco de N.E.M. en Metz, nombro da partoprenantoj en kelkaj minutoj firme promesis donaci pliajn 23.000 dkr. Do, necesas havigi ankoraŭ minimume 54.000 dkr. La subskribinto fidus, ke tiu sumo, aŭ eĉ multe pli, estos kolektita en la sekvantaj semajnoj surbaze de la subaj principoj pri partopreno, interkonsentitaj inter la unuaj kontribuintoj.

Principoj pri Partopreno

1. La starigo de la Jubilea Esperanto-Monumento koncernas la tutan esperantistaron, sed pro praktikaj kaŭzoj ICNEM prizorgos la kolektadon de donacoj.
2. Donaco de individuo, societo aŭ grupo estu *minimume 500 dkr.* aŭ egalvaloro laŭ la kurzo en la tago de la pago. Pli grandaj donacoj estos speciale bonvenaj. Informoj pri la ricevataj donacoj regule aperados en la revuo *Horizonto*. Laŭdezire anonimeco estos respektata.
3. La donacintoj havos honorlokojn dum la inaŭgura solena ceremonio. Iliaj nomoj estos presitaj en speciala Jubilea Dokumento, kiu post la ceremonio estos deponita en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Ĉiu donacinto ricevos kopion de la Dokumento.
4. Se la tuta kolektita sumo superos la minimumon de 100.000 dkr., la pluso estos utiligita unuavice por kovri la eventualajn pliajn kostojn kaj, duavice, por kiel eble plej efika kaj vasta informado pri la atingoj de Esperanto sur la kultura kampo.

Urĝa Peto

La subskribinto afable petas ĉiujn, kiuj jam firme promesis donaci, kaj ĉiujn, kiuj deziras finance kontribui por la starigo de la monumento, sendi *senprokraste*, se iel eble jam antaŭ la 1-a de decembro 1985, siajn donacojn al la kasisto de ICNEM, S-ro Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, poŝta ĉekkonto: Kopenhago 1 19 06 01. Escepte, se pli simple por la donacintoj, el *Aŭstrio* oni povas sendi la donacojn al D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, pĉk. 1257.845; el *Francio* al S-ino Madeleine de Zilah, 39 rue Joseph Hénrot, F-57070 Metz, pĉk. 262.033W Nancy; el *Britio* per ĉeko je la nomo de la subskribinto, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF. NE FORGESU MENCII, KE LA SENDITA SUMO ESTAS VIA DONACO POR LA "JUBILEA ESPERANTO-MONUMENTO".

Anticipan dankon al ĉiuj, kiuj kontribuos por la starigo de monumento al neŭtrale-homa lingvo en internacijure rekonita neŭtrala Aŭstrio.

Ivo Lapenna

/Noto: La redakcio de *Horizonto* petas la redakciojn de ĉiuj Esperanto-periodaĵoj represi la supran tekston./

PLIA HISTORIA DOKUMENTO: PROPONO DE ICNEM AL UEA KAJ SAT

/Redakcia noto: Sube ni publikigas la tekstojn de la letero de ICNEM de 22.06.85 al la Estraro de UEA kaj al la Plenumkomitato de SAT, kaj de la Projekto de Kontrakto pri Kunlaboro Okaze de la Jubilea Jaro 1987. La ĉefkunveno de ICNEM, okazinta en Metz fine de julio, unuanime aprobis la proponon, kiel vidiĝas el pkto 3 de la Decidoj. Nun ICNEM atendas la reagojn de UEA kaj de SAT. Espereble, ni povos pri tio informi en la sekvanta n-ro de *Horizonto*. /

Al la Estraro de UEA pere de la Co

22.06.85

kaj

Plenum-Komitato de SAT pere de la Administrejo

Estimataj,

Kiel konate, la klopodoj de ICNEM organizi komunajn agadojn surbaze de Komuna Baza Agadprogramo por la Jubilea Jaro, bedaŭrinde malsukcesis.

Tial la Plenuma Komitato de ICNEM komisiis min proponi al vi Kontrakton pri Kunlaboro Okaze de la Jubilea Jaro. La motivoj de nia propono troviĝas en la preamblo de la aldonita Projekto.

Kiel vi vidas, temas pri tute mallonga kontrakto de nuraj kvin principoj. Ni fidas, ke eĉ tia tute konciza kontrakto, se lojale plenumata, konsiderinde helpas al maksimuma sukcesigo de la Jubilea Jaro kaj ĝuos apogon de la vastaj tavoloj de la esperantistaro.

Superflue emfazi, ke temas pri projekto. Se vi principe akceptos la proponon, en la projekto oni povas ion ellasi, aldoni aŭ ŝanĝi laŭ viaj deziroj, tiel ke ni interkonsentu pri la definitiva teksto.

Mi prezentos la proponon al la jara ĉefkunveno de ICNEM, okazonta en Metz fine de julio. En la nomo de nia Plenuma Komitato mi afable vin petas prezenti nian proponon al viaj respektivaj decidpovaj organoj dum viaj baldaŭaj kongresoj. Mi ankaŭ petas informi min kiel eble plej baldaŭ post viaj kongresoj pri la akcepto aŭ malakcepto de la propono.

Kun estimo kaj salutoj,

Prof. D-ro Ivo Lapenna
Prezidanto de ICNEM

Projekto

KONTRAKTO PRI KUNLABORO

OKAZE DE LA JUBILEA JARO 1987

INTER

INTERNACIA CENTRO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO (ICNEM),
SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) kaj
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (UEA)

ICNEM, SAT kaj UEA (en la fina teksto ĉiu el la tri organizaĵoj povas meti sian nomon sur la unuan lokon).

Konsiderante, ke la 100-jara datreveno de la Internacia Lingvo (Esperanto) en 1987 estas unika evento en la kultura historio de la homaro kaj ke tial necesas memorigi ĝin kiel eble plej digne kaj vaste ne nur interne de la Esperanto-Movado, sed ankaŭ ekster ĝiaj vicoj en ĉiuj medioj interesitaj pri la venko de la lingva obstaklo en internaciaj rilatoj;

Konsciaj, ke la organizita Esperanto-Movado estas la kerna forto por altnivela organizo kaj samtempe por diskonigo de la atingoj de Esperanto sur ĉiuj niveloj kaj en ĉiuj branĉoj de internacia komunikado;

Konstatante, ke niaj tri organizaĵoj reprezentas rekte aŭ nerekte preskaŭ ĉiujn tendencojn, fluojn kaj fakojn en la nuntempa Esperanto-Movado kaj ke, malgraŭ la diverseco de la celoj, ĉiujn unuigas la aparteno al la monda esperantlingva komunaro kaj la intereso plu progresigi la Internacian Lingvon;

Resolutaj ne sole atingi dignan celebradon de la 100-jara datreveno kaj esprimi omaĝon al D-ro L.L. Zamenhof, la genia iniciatinto de Esperanto, sed ankaŭ utiligi la okazon por grandskala disvastigo de la lingvo kaj de ĝiaj aplikoj en ĉiuj vivsferejoj;

Konvinkitaj, ke tiuj celoj estas maksimume adekvate atingeblaj nur per reciproka helpado, kaj fidante, ke tia interhelpo pozitive eĥos en la tuta esperantlingva komunaro.

DECIDIS subskribi tiun ĉi Kontrakton pri Kunlaboro Okaze de la Jubilea Jaro de Esperanto (1987) kaj devontigas sin agi laŭ jenaj

PRINCIPOJ

1. Ĉiu el la tri organizaĵoj regule informados la du aliajn pri siaj respektivaj planoj por la Jubilea Jaro kaj pri ĉiu konkreta realigo antaŭ kaj dum la Jubilea Jaro.

2. Komunikadoj de ne pli ol 200 vortoj rilatantaj al konkretaj atingoj lige kun la Jubilea Jaro kaj liveritaj de unu el la tri organizaĵoj estos publikigitaj en la organoj de la du aliaj.

3. Ĉiu el la tri organizaĵoj invitos la du aliajn reprezentiĝi kaj esprimiĝi en la jubileaj kongresoj, konferencoj, festivaloj, simpozioj kaj similaj renkontiĝoj, aŭ al alispecaj solenaĵoj, kiujn ĝi organizas, kaj la invititaj organizaĵoj klopodos akcepti la invitojn kaj kontribui al la sukceso de la koncernaj aranĝoj.

4. Surbaze de reciprokeco ĉiu el la tri organizaĵoj kunlaboros kun la du aliaj en ĉiuj agadoj, kiuj kontribuas al progresigo de Esperanto kaj al fortikigo de la tuta Esperanto-Movado en la mondo.

5. Kun la escepto de la sindevigoj akceptitaj per tiu ĉi Kontrakto, ĉiu el la tri organizaĵoj konservas sian planan sendependecon.


Farita en la

Por ICNEM:

Por SAT:

Por UEA:

Lingvo kaj lingvo-projekto



Tra la jarcentoj aperis centoj da malsukcesaj projektoj por lingvo universala. Ĉi tiu projekto de J. Damm (1876) uzis signojn por prezenti, per kombinaĵoj, la bazajn konceptojn de la homa lingvo.

En la ĉapitreto pri la kvalito de nia informado la Principaro de Frostavallen rekomendas ne menciadi "diversajn projektojn de komuna lingvo".

Kian sencon havas tiu rekomendo, kaj ĉu ĝi ankoraŭ estas aktuala?

Dum multaj jaroj - fakte ekde la naskiĝo de Esperanto - personoj okupiĝantaj pri la disvastigo de la lingvo kutimis, en siaj skribaj aŭ parolaj eksplikoj, proprainiciate menciadi ankaŭ diversajn projektojn de internacia komunikilo kaj nomadis ilin "internaciaj lingvoj". En la lastaj jaroj oni denove komencis fari la saman eraron kaj nun ĝi ricevis amasajn proporciojn. La formulo kutime estas: ja ekzistas "multaj internaciaj lingvoj", sed "Esperanto estas la plej bona".

Pro tiu grava misprezento, en nacilingvaj gazetoj, periodaĵoj, enciklopedioj kaj aliaj verkoj oni ofte egaligas nian lingvon kun *volapŭk*, *ido* kaj aliaj, pli ĝisdataj, lingvoprojektoj, kvazaŭ ili havus similan aŭ eĉ saman socian valoron. Unu el la sekvoj estas, ke en decidaj rondoj kaj ĝenerale en la publika opinio kreiĝas konfuza aŭ falsa imago pri la fakta situacio kio siavice bremsas, kelkloke eĉ malebligas, la normalan progresadon de la Internacia Lingvo. La pozitivaj klopodoj estas renkontataj de pasiva sinteno aŭ rezisto eĉ en tiuj medioj, kiuj sentas la lingvan problemon kaj principe simpatias la solvon pere de neŭtrala lingvo. Ili starigas la demandon: "Kiu, do, lingvo, se ekzistas tiom da ili?"; kaj konsilas: "Unue la protagonistoj de diversaj 'internaciaj lingvoj' interkonsentu pri unusola, kaj poste venu al ni".

Bedaŭrinde, al tiu deformita bildo abunde kaj tute superflue kontribuis nia propra informa aparato: abunde, ĉar la vasta publiko, kun la escepto de strikte fakaj medioj, apenaŭ sciis ion ajn pri la okcento da provoj krei internacian komunikilon, se ni mem ne parolus pri ili; superflue, ĉar oni povas bonege informadi pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj ĉiufankaj atingoj, komplete ignorante la diversajn lingvoprojektojn.

"Superflue" ne signifas "neniam", nek ĝi iel ajn implicas ian kvazaŭan timtreman fuĝon. Se la cirkonstancoj postulas, ne nur ne estas superflue, sed efektive necesas objekte prezenti ankaŭ tiun aspekton. Tio, ekzemple, devas okazi en serioza verko pri la historio de la mondlingva problemo, aŭ en respondo al konkreta demando dum iu intervjuo aŭ gazetara konferenco. En tiaj aŭ similaj cirkonstancoj la elementa postulato estas nete distingi inter Esperanto kiel vivanta lingvo, unuflanke, kaj ĉiuj lingvoprojektoj, aliflanke, kiel konsilas la Principaro de Frostavallen.

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

FONDAĴO IVO LAPENNA

Saldo	14.305,78 dkr.
D-ro Klaus Perko, Aŭstrio	774,00 "
S-ro Gösta Persson, Svedio	1.000,00 "
	16.079,78 dkr.

Lingvo kaj lingvo-projekto (Daŭrigo)

La dividlinio inter la du estas klara kaj simpla. Ankaŭ en tiu ĉi sfero akumulitaj kvantaj kreskoj transformiĝas en esence novan kvaliton. Lingvo estas instrumento de socia komunikado en ĉiuj sferoj de la vivo. Abstrakta sistemo de komunikreguloj, eble eĉ perfekta en sia abstrakta strukturo, sed ne uzata por interhoma komunikado en relative alta skalo, tute ne estas lingvo. Ankoraŭ malpli "internacia", ĉar por tio, aldone, estas bezonata ankaŭ vera internacieco almenaŭ el kvar vidpunktoj: interna lingva konsisto, geografia etendiĝo, socia portanto kaj celo. Plej taŭge estas nomi tian sistemon "projekto" aŭ "lingvoprojekto".

Ankaŭ Esperanto komencis sian ekzistadon kiel lingvoprojekto. Tamen, dank' al nombro da decidaj kvantaj faktoroj - ekde literatura kaj scienca kreado, tra vasta gamo da ĉiaspecaj fakaj kaj specialaj aplikoj, ĝis multnombraj ĉiutagaj rilatoj, eĉ familiaj - Esperanto transformiĝis en vivantan lingvon de vivanta kolektivo, dum la aliaj projektoj neniam sukcesis eliri el tiu embria stadio. Inter vivanta lingvo, parolata entute de centmiloj da personoj tra la mondo, kaj mortnaskitaj projektoj ja estas principe grava diferenco. Tial, fakte, ekzistas nur unu vere internacia lingvo: la Internacia Lingvo aŭ Esperanto.

En la informado okaze de la Jubilea Jaro oni nepre atentu la supran konsilon en la intereso de Esperanto.

Aliaj konsiloj en la sekvantaj n-roj de *Horizonto*.

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

LA GAZETO

DUSEMAJNA
KLERIGA PERIODAĴO DE M.F.K.A. =
18x24 PAĜOJ = 22 EĴUOJ =

NIA UNIVERSITATO = NIA GIMNAZIO =
NIA LERNEJO = INSTRUADO LAUSISTEMA
DE LA ESPERANTO-KULTURO =

LA PLEJ OFTAJ MOVADAJ NOVAĴOJ =

NEPRAS AL ĈIUJ VERAJ
ESPERANTISTOJ.

ABONU PER SIMPLA LETERO ĈE:

LA GAZETO 39 RUE JOSEPH HENOT
57070 METZ — FRANCIO

AU ĈE NIAJ PERANTOJ



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

Redaktas Salvador Gumà, Paseo Prim, 38-7-6, Reus, Tarragona, Hispanio.

Sennacieca Revuo alvenis. Scivole oni trafolumas ĝin sciante ke ĝi ĉiam portas interesajn kaj instruajn artikolojn. Ni ne seniluziiĝis. La unua, naŭpaĝa, artikolo verkita de *Henk Beijne*, pentras bildon de Nederlando. Henk Beijne estas pedagogo. Li scipovas la arton instrui tiel, ke la legantoj, lernantoj, neniam forgesos: "... la homoj loĝas grandparte ĉe la mara flanko. Verŝajne pro tiu neekvilibra ŝarĝo la lando malaltiĝis je ĉi tiu okcidenta flanko ...ktp." Tre leginda!

Plej interesa al ni esperantistoj estas la artikolo de *Lilio Grandiĉre*: "*Pri rasoj kaj rasismo*". Ni ne povas ne citi la finon de ŝia artikolo: "Kiel batali kontraŭ rasismo? Ĉiu individuo nepre konsciu pri la rasa heterogeneco, faktoro de homprogreso, ĉiu akceptu la diversecon de la aliaj, ĉiu provu kompreni ilin. Kolektive, ni ĉiuj postulu la senprokrastan plenumon de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj, kaj de la landaj Konstitucioj, kiuj kondamnas rasismojn; ni subtenu la movadojn, kiuj nacie kaj tutmonde defendas la homan dignon, kiel ekzemple faras "Amnestio Internacia". Kontraŭrasisman batalon devus aktive partopreni ĉiuj esperantistoj. *Ĉar iu joda pola infano suferis pro konfliktaj rilatoj inter kvar etnaj grupoj, Esperanto naskiĝis* (substreko nia).

Per uzado de la Internacia Lingvo la esperantistoj posedas unikan interkomprenilon. Ni esperu ke nia komuna lingvo tutmonde disvastiĝos kaj ebligos al la homspecio pli efike lukti kontraŭ la plej teruraj plagoj de la homaro: naciismo kaj rasismo".

Sincere ni komplementas al S.A.T. pri ĝia jara *Sennacieca Revuo*. S.A.T. transprenis la rolon de UEA esti (post la hamburgaj eventoj) mondorganizaĵo kiun oni daŭre povas aprezi kaj respekti pro la sincereco kaj honesteco en ĝia poresperanta laboro.

Mendu la jarkajeron *Sennacieca Revuo* ĉe S.A.T., 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris. Prezo 28 FF aŭ egalvaloro. Vi ne pentos.

P. Z.

RICEVITAJ POR MENCIO

HORIZONTO DE SOVETA LITOVIO

8-a kajero, red. O. Deveikienė kaj al., Vilnius, 1985, 56 grandformataj paĝoj, prezo: interŝanĝe kontraŭ proks. samvalora eldonaĵo el alia lando je la adreso Kociuškos 36, SU-232600, Vilnius, Litova SSR.

Enhavo laŭ jenaj rubrikoj: paco, beletro, esperantologio, originala verkado, kultura vivo de Litovio, Esperanto-agadoj en 1984. Konsiderinda malpli da sovetiisma vulgara propagando, ol, ekzemple, en *der esperantist*, *Starto* kaj *Bulgara Esperantisto*. Pluraj tre legindaj artikoloj, precipe tiu de B. Kolker pri "Influo de Rusa Lingvo al Verba Sistemo de Esperanto".

Pli ol 460 internaciaj Esperanto-renkontiĝoj - kongresoj, konferencoj, simpozioj, seminarioj, kursoj, turismaj aranĝoj - okazis en 1985 aŭ okazos ĝis la fino de la jaro.

Ŝakĉampiono kaj esperantistino Zsuzsa Polgar estas 15-jara hungara junulino, kiun la anglalingva ŝakmagazino *CHESS* rigardas "la plej granda ŝakludantino en la mondo". Zsuzsa je la aĝo de 15 havas iom pli altan gradon laŭ la internacia sistemo de gradigado, ol havis la nuna mondĉampiono Jurij Karpov je la sama aĝo. Antaŭ tri jaroj Zsuzsa kun sia patrino ĉeestis kunvenon de la Londona Esperanto-Klubo.

ZET, la organo de Zagreba Elektra Tramo jam multajn jarojn havas en ĉiu n-ro Esperanto-paĝon en du partoj. La unua parto, en la kroata, konsistas el tradukoj de esperantlingvaj artikoloj senditaj de korespondantoj el diversaj landoj; la dua parto, en Esperanto, informas pri interesaj novaĵoj rilatantaj al ZET. Tiu grandformata Esperanto-paĝo estas, fakte, multe pli faka, ol pluraj t.n. fakaj Esperanto-periodaĵoj. Interesiĝantoj certe povas ricevi specimenojn de: Redakcio de ZET, Esperanto-fako, Rade Končara 239, PF 911, Zagreb, Jugoslavio.

La organo de Itala Esperanto-Federacio, "L'Esperanto", informis en n-ro 5/85 pri "La Membraro de UEA en 1984". La redaktoro, Aldo de' Giorgi, sciigas la legantaron, ke en 1984 la nombro de la membroj de UEA estis 39.005. Li aldonas: "En 1974, lasta jaro de la imperio Lapenna, ili estis 32.600". Li "forĝesis" klarigi, ke neniuj kontrolas, ĉu fakte Pollando havas 6700 asociajn membrojn, Bulgario 5110, Hungario 3115, Ĉeĥoslovakio 2372 kaj GDR 400, entute 17.697 aligitajn membrojn en 5 blokaj landoj, t.e. *iom malpli ol duono de la tuta membraro de UEA*. Tiu senkontrola akcepto de la tiurilataj asertoj de la koncernaj landaj asocioj donas al ili tre grandan nombron da komitatanoj en la Komitato de UEA. Ili, kune kun la "kunvojaĝantoj", fakte regas en UEA ekde 1974. Aldo de' Giorgi ankaŭ "forĝesis" menciigi, ke en 1973, la lasta jaro de la demokrata, neutrala kaj sendependa UEA sub prezidanteco de Ivo Lapenna, la nombro de la kernaj, *individuaj* membroj, kies kotizoj formas la bazan enspezon de UEA, estis 7231, dum en 1984 ĝi malaltiĝis al nuraj 6256.

La Konsilio de Itala Esperanto-Federacio forte kritikis la redaktoron de "L'Esperanto", Aldo de' Giorgi, dum sia kunsido de la 24-a de marto 1984. Unu el la konsilanoj deklaris, ke "maksimume unu n-ro de la revuo ne meritas forĵeton en la paperkorbon kaj povas esti montrata sen sento de honto". Ne surprize, ke neniuj kontraŭargumentis. Rezulte, Aldo de' Giorgi ekŝiĝis el sia ofico de redaktoro.




Hispanan Esperanto-Muzeon oni antaŭ nelonge transdonis al la fondaĵo Heredposedaĵo de la Muzeoj de la Parlamento de Katalunio. La foto montras momenton en Sant Pau d' Ordal, dum kiu la prezidanto de Katalunio, S-ro Jordi Pujol (maldekstre), interparolas kun S-ro Luis Hernandez-Yzal, la fondinto de la muzeo kaj nuna vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.

La negativa saldo en la Spezkonto de UEA por 1984 estis 115.392,19 ned. gulde-
noj, la plej granda en la tuta historio de UEA. Tio estas jam la tria sinsekva
jaro de grandaj deficitoj en la financoj de la Asocio. Ili estas des pli ŝokaj, ĉar
preskaŭ ĉiuj aktivadoj de UEA el la periodo antaŭ 1974 estas aŭ nuligitaj aŭ
neglektataj. La buĝetpropono por 1986 antaŭvidas plian negativan saldon de
45.300 ned. gld. La redaktoro de *Esperanto* konsolas la legantojn per la aserto,
ke la deficitado de 1984 estas 15% de la elspezoj kaj ke ĝi estas "proporcie malpli
granda ol estis negativaj saldoj antaŭ deko da jaroj" (n-ro 5/85, p. 81). Kiel
kutime en la nuntempa UEA, ankaŭ tiu aserto estas malĝusta. Fakte, kiel ĉiu
ajn povas facile kontroli, la meza jara deficitado en la periodo 1966-1973 estis 6,8%
de la elspezoj (kaj ne pli ol 15%) malgraŭ la multnombraj, multflankaj efikaj
agadoj, duoble granda *Jarlibro* ktp. Eĉ se oni prenis en konsideron la
manipulitan deficiton de 1973, la meza deficitado estus nur 8,65%, sed la kapitalo
samtempe kreskis de jaro al jaro pro aliaj enspezoj. En la Komitato de UEA
versajne troviĝis almenaŭ kelkaj komitatanoj, kiuj kritike rilatis al la Estrara
Raporto, inkluzive la financon situacion de la Asocio.

Jesper Neergaard, nia jam fama dana skulptisto, ĵus finpretigis grandiozan
komponaĵon elmartelitan de marmora bloko peza 25 tunojn. La skulptaĵo,
dankesprima ovacio de la artisto al *La Naturo*, havas nun sian lokon sur la
monto *Kloster Alp* apud St. Gallen en Svislando.

En la nuna aŭtuno J. Neergaard kreos same grandan skulptaĵon por la urbo
Omaha en Usono.



Jesper Neergaard kaj lia helpanto
dum la laboro en Marina di Carrara, Italio

Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko (TAKIS) okazigis
sian unuan internacian kongreson sub la nomo INTERKIBERNETIK en Budapeŝto
de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1985. Raporto pri la rezulto ne atingis
nin ĝis la finredakto de tiu ĉi rubriko.

La Instituto pri Kibernetiko (direktoro: Prof. Helmar Frank) ĉe la universitato
de Paderborn havas ekde kelkaj monatoj gaston el la Ĉina Popola Respubliko.
Inĝeniero Zengyan FENG, docento pri klerigteknologio en la sudĉina universitato
en Kanton, studas prospektivan klerigsciencon en la Paderborna Universitato.
Krome li kunlaboras pri esplorprojektoj de la instituto dum sia dujara restado,
kiu estas subtenata de la ĉina edukministerio.

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo fondiĝis en aŭgusto dum la UK en
Aŭgsburgo, 1985. Informojn donas la prezidanto, S-ro F.J. Braun (Okcidenta
Germanio) aŭ la Ĝenerala Sekretario, S-ro Lawrence Mee, Mondkomerca Eldonejo
Esperantista, P.O. Kesto 25041, NL-3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Sukcesa Disvastigado en Brazilo. 608 aliĝintoj el 18 brazilaj ŝtatoj kaj unu el
Usono. Jen la ciferoj kiuj ebligas al ni aserti ke la 21-a Brazila Kongreso de
Esperanto, okazinta en Belo Horizonte de la 17-a ĝis la 21-a de julio, estis unu

el la plej grandaj naciaj Esperanto-kongresoj en Brazilo. Belo Horizonte estas la tria plej granda urbo de la lando, kun 1.500.000 da enloĝantoj. La kongreson organizis Belo-Horizonta Esperanto-Asocio, kies ĉefa sukceso estis la grandega atento, kiun la amaskomunikiloj direktis al la evento.



Placo Zamenhof, kie la partoprenintoj fine kolektiĝis

Esperanto-Asocio de Brasilia-EAB iniciatis lanĉadon de disko kun nuntempa brazila populara muziko kantata en Esperanto. La disko estas aĉetebla ĉe: Associacao Brasiliense de Esperanto, Poŝtkesto 11-1124, 70084 - Brasilia (DF)

Esperanto-Asocio de Brasilia okazigis Kulturen Semajnon de la 22-a ĝis la 28-a de julio 1985 kun partopreno de esperantistoj el 8 brazilaj ŝtatoj. Ĵurnaloj raportis, kaj tri tagojn la radio havis intervjuojn kun la kursgvidanto Prof. GERALDO MATTOS.

Nekrologoj

Lajoŝ Kőkeny, kunredaktoro de la fama *Enciklopedio de Esperanto* en du volumoj (Budapeŝto, 1933-1935) kaj unu el la plej kleraj kaj elstaraj figuroj de la antaŭmilita Esperanto-Movado, aktiva en Hungario ankaŭ post la milito, forpasis en Budapeŝto la 27-an de aprilo 1985 en la aĝo de 88 jaroj.

Vilho Setälä (1892-1985), mondkonata pioniro de Esperanto en Finnlando, verkinto de lernolibroj, el kiuj la plej konata estas *Privilegia Vojo al Lingvoscio* (Esperanto); tradukinto de pluraj gravaj verkoj el la finna; fondinto de la Fonduso Esperanto; multjara prezidanto, poste Honora Prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj Honora Membro de UEA, multjara membro de la Akademio de Esperanto. Longa nekrologo en *Esperanto*, n-ro 7-8/85.

Mark Starr (1894-1985), unu el la pioniroj de la laborista Esperanto-Movado kaj samtempe efika aktivulo en la ĝeneralaj agadoj por disvastigo de Esperanto en Usono; dum pluraj jaroj vicprezidanto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (ELNA); siatempe reprezentanto de UEA ĉe la Sekretariato de UN en Novjorko; aŭtoro de kelkaj libroj en la angla-usona kaj de multaj artikoloj.

D-ro Mario Dazzini (1910-1985), tre aktiva en la itala Esperanto-Movado; prezidanto de Itala Esperanto-Federacio dum kelkaj jaroj; ekde 1968 sekretario de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI); ĉefdelegito de UEA por Italio ĝis 1974, kiam li ekŝiĝis el tiu funkcio pro la konataj hamburgaj eventoj.

Al la familioj de la eminentaj forpasintoj sinceran kondolencon.

LA REDAKCIO RESPONDECAS PRI LA ĜENERALA LINIO DE HORIZONTO. SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ NE NECESE REFLEKTAS LA STARPUNKTON DE LA REDAKCIO AŬ DE I.C.N.E.M.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: Kiu ajn el la funkciuloj de la Centro (v. sube)

FONDO KAJ CELOJ

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala, sendependa Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havas nur limigitan nombron da ordinaraĵoj membroj.

MEMBRECO

ICNEM konsistas el tri kategorioj de ordinaraĵoj membroj, kies respektivaj kotizoj estas: *Aktiva Membro* 50 sv. fr. aŭ 200 dkr. jare; *Subtenanto* 1000 sv. fr. aŭ egalvaloro unufoje por ĉiam; *Bonfaranto* 2000 sv. fr. aŭ egalvaloro unufoje por ĉiam. Pri aliĝoj kaj pagoj v. sube.

PLENUMA KOMITATO

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA9 8TF, Middlesex, Britio

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio

Sekretario S-ino MADELEINE DE ZILAH, 39 rue Joseph Hénot,
F-57070 Metz, Francio

Kasisto S-ro PETER ZACHO, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio
Tel.: (01) 415615 - (01) 876651; pĉk.: Kopenhago 1 19 06 01

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de la Centro ricevas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ aparte abonebla rekte ĉe la administracio aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bv. havigi ĉe kiu ajn el la funkciuloj. La kasisto akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (poŝtĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bv. atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli simple pagi al la prezidanto, unu el la vicprezidantoj, aŭ al la sekretario, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo ordigos tion kun la kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*



El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata, la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo kaj japana traduko de Retoriko.

Ĉiuj verkitaj en modela Esperanto.

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 10 anglaj pundoj, 140 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 7 anglaj pundoj aŭ 98 dkr. (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de "Retoriko", 152 p., fortike broŝurita, prezo 7 anglaj pundoj, 98 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularsciencia kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 70 dkr. aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplementa sen "Hamburgo en Retrospektivo", bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 70 danaj kronoj, aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de januaro 1984. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia "Libroservo de NEM", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio. Kun escepto de "Esperanto en Perspektivo", la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro: 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de "Hamburgo en Retrospektivo" estas mendeblaj ĉe s-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe "ELDONEJO PERSPEKTIVO", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidariga funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en HORIZONTO, ili estas la plej trafa respondo al la pseŭdosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la zamenhofa esperantismo ...

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio